
# FORUMO

Oficiala Organo de la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj • Numero 128 • Apr | Maj | Jun 2005

## Kiel Geja Estas Vilno?

### Junulo rakontas pri sia geja esplorado de Litovujo



### Ĉu esperantistoj kaj gegejoj povas helpi sin reciproke?

## Respondas Renato Corsetti !

# FORUMO

**Oficiala Organo de la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

Numero 128 • Apr|Maj|Jun 2005



**LA LIGO DE SAMSEKSAMAJ GEESPERANTISTOJ**

**Prezidanto:Arnold Victor**
Apartment 1, 160 West Eleventh St.
New York City, New York 10011 • USA
*arvimide@earthlink.net*

**Sekretario-Kasisto: Rolf Köhler**
Bergstraße 78
D-01069 Dresden • Germanujo
*lakasisto@gmx.de* | *lasekretario@gmx.net*


Por informoj pri membriĝo al LSG, kaj por legi la malnovajn numerojn de Forumo:

**http://www.forumo.hpg.com.br**


**REDAKTADO & GRAFIKA DESEGNO**

**Redaktoro: Igor Couto**
P. O. Box 4545
North Rocks NSW 2151 • Aŭstralio
*igor@pixelmedia.com.au*



“Forumo” estas kompostita kaj aranĝita per komputilo Apple, uzante la programon “InDesign” de Adobe kaj la tiparajn familiojn “Didot” kaj “Futura”.


**KONTRIBUOJ**

Ni akceptas artikolojn, eseojn, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn originalan materialon. Sendu vian kontribuon al **la redaktoro.**

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone, teksto povas esti mallongigita.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn de la LSG.


© 2005, LSG - ĉiuj rajtoj rezervitaj.


## Anoncas la Prezidanto

Estas jaro por nia konveno kadre de la UK en Vilno. Mi tre bedaŭras anonci, ke nia longdaŭra ano tie ĵus mortis, do, konsolo al lia partnero estos nia devo dum tiu ĉi kunveno.

Alia devo estas elekto de estraro. Mi jam atingis kaj la aĝon kaj la elĉerpiĝon de mia kapablo servi kiel prezidanto, do, kandidatoj por tiu ĉi posteno kaj aliaj sin prezentu.

Mi volas profiti de tiu ĉi okazo por dankegi al la nova redaktanto de “Forumo” por lia volontula laboro kaj refoje danki al Rolf kaj Andreas, kiuj servis tiom bone al “Forumo”.

Dum la lasta tempo ĉiutaga interŝanĝo de mesaĝoj per interreto iĝis kutima. Mi volas certigi al tiuj sen aliro al la interreto, ke iliaj kontribuoj pere de “Forumo” kaj aliaj rimedoj ankoraŭ estas kerna agado de LSG.

Gravaj informeroj pri la programo de la UK ankoraŭ ne estas pretaj. Tamen, la estraro de LSG zorgos por mendi salonon por nia kunveno, kaj laŭkutime estos agado, eble kunveno, dum la kongresa bankedo kaj balo; ĉio estos aranĝata okaze de taŭgaj anoncoj sur la kongresa retpaĝo. Kontrolu “Forumon” por niaj anoncoj aŭ sendu al mi mesaĝon aŭ leteron, kaj mi donos al la petinto la plej lastan informon tiurilate.

Mi esperas renkonti la plej grandan nombron da LSG-anoj en Vilno. ▼

*Arnold Victor*

## Enhavo


Anoncas la Prezidanto .................... p. 2
El Nia Mondo ................................. p. 3
Profilo............................................. p. 5
Vidpunkto ...................................... p. 6
Laste............................................... p. 8






# Bonvenon al Geja Vilno

*Dek jarojn post la legalizado de samseksamo, Litovujo ankoraŭ rangas meze de la malplej toleremaj eŭropaj nacioj. Ĉu tio signifas, ke por la gegejaj vojaĝantoj ne valoras la viziton?*



Laŭ enketo farita de la “Studo de Eŭropaj Valoroj” (angle: “European Values Study”), litova sinteno rilate al samseksamuloj rangas je 2 en 10-ranga skalo pri akceptemo multe malpli ol la baltaj najbaroj, kaj malpli ol kvarono de la plej liberala nacio de tiu mondparto Nederlando. Laŭ la “Litova Geja Ligo LGL” surrete ĉe: *http://www.gay.lt* advokatoj en Anglujo, Kanado, Usono, Francujo kaj Belgujo informis kaj al ĝi, kaj al aliaj aŭtoritatoj, ke litovaj gejoj kaj lesboj petas azilon pro persekuto pro sia seksorientiĝo.

Tamen, ne fortimigita, mi fruaŭtune ekvojaĝis al la ĉefurbo de tiu nacio laŭdata kiel la “Nova Prago” por pasigi unu semajnon en unu el la plej ĉarmaj landoj de Eŭropo. Pro miaj avaraj kutimoj, mi elektis fari la vojaĝon per la plej malmultekosta maniero, kaj elektinte malalt-klase, mi troviĝis vagonare inter malafabla polo kaj malkomforta muro. Alveninte lacega sed kapriolema en Vilno 40 horojn post la forlaso de Britujo, kaj survoje al mi feria loĝejo, la unuaj impresoj valoris la penon, jam kiam mi meandris trans la urbon kiu pretendas esti la plej granda “Malnova Urbeto” de Eŭropo. Gapante la jovialajn litovojn, babilantajn sur la ŝtonpavimitaj stratoj, dum la suno ekbrilis super la multaj lokaj turpintoj, estis malfacile kredi ke kontraŭgejaj sentoj ekzistas en tiel harmonia urbo.

Dum mia rekognoska ekspedicio al Vilno, la unua halto estis ĉe tio, kion multaj gejaj litovoj konsideras sia ĉefa opozicio la Katolika Eklezio. La Katedralo de Vilno originas de la 15a jarcento, la ‘ora epoko’ de Litovujo, sub la rego de Granda Duko Vytautas, kiam la imperio atingis la Nigran Maron. Poste multfoje modifita, la Katedralo estas nun brilanta blanka bastiono de la Litova Rom-Katolika Eklezio, videbla tra la urbo.

La baroka katedralo kontrastas al la proksima majstroverka Preĝejo de Sankta Anna. Konstruita el pli ol 33 malsimilaj specoj da brikoj, ĝi estas gotika trezoro, kun abundo da turpintoj, arkoj kaj apogpilastroj. Laŭ



historiaj fontoj, ĝi tiom impresis Napoleonon, ke li deklaris, ke li volis kunporti ĝin reen al Parizo, “en la polmo de la manoj”. La ĉieeco de tiuj kaj multaj aliaj preĝejoj en la Malnova Urbeto de Vilno, memorigas vizitantojn ke Litovio estas forte katolika. Malgraŭ papa deklaracio, ke “samseksamuloj devas esti akceptataj per respekto, kompato kaj sentivo”, multaj opinias ke la sinteno de la loka eklezio estas apatia, kaj ke ili ne penas batali kontraŭ loka diskriminacio.

La vera kulpo originas, laŭ diversaj vidpunktoj, de la antaŭtempa Sovetia rego. Ekde la komenca okupacio en 1940, samseksamaj rilatoj fariĝis kontraŭleĝaj. Artikolo 122 kiu deklaris: “Viro Kuŝanta kun Viro: Seksaj rilatoj inter viroj(...) estu punendaj per mallibereco ĝis 5 jaroj” estis nuligita nur en 1993, pro internacia premo.

La timigaj restaĵoj de la Sovetia erao ankoraŭ videblas en Vilno plej evidente ĉe la antaŭtempa konstruaĵo de la KGB, kiu nuntempe fariĝis la Muzeo por Genocidaj Viktimoj. Tiu “domo de hororoj” estas atesto de la teruroj de la Sovetia rego. Transvivintaj eks-enŝlositoj gvidas la vizitantojn tra la malĝojaj ĉeloj. Dum oni iras de ĉelo al ĉelo, oni rimarkas diversajn makabrajn detalojn: pendantajn frenezjakojn, sangajn makulojn sur la muroj, kaj la remburitajn pordojn, kiuj dampis la kriegojn de la prizonuloj. Kelkfoje, tiuj ĉeloj enhavis ĝis dudek homoj, kun apenaŭ da spaco por stari. Kvazaŭ tio ne estus sufiĉa torturo, la enŝlositoj daŭre timis esti sendataj al la specialaj ĉeloj de puno. Pro paroli al aliaj enŝlositoj, oni estis sendataj al la izoleca ĉelo, kie oni estis lasita nuda, en la mallumo, kaj la latrino estis truo en la grundo. Se oni rifuzis paroli al la gardistoj, oni estis okulbandaĝita, kaj poste lasita, jam sencele batita, en remburita ĉelo.

> “ Gapante la jovialajn litovojn, babilantajn sur la ŝtonpavimitaj stratoj, dum la suno ekbrilis sur la multaj lokaj turpintoj, estis malfacile kredi ke kontraŭgejaj sentoj ekzistas en tiel harmonia urbo.”

Tamen, reirinte en la kolorplenajn stratojn de la Malnova Urbeto, oni estas tre malproksima al tiuj aĉaj scenoj. Terasaj

*daŭrigo en paĝo 8*







prezentante al vi la homan elementon de LSG

# Matthew McLauchlin

“Por mi gejeco estas beno. Tiom da bonaj aferoj en la vivo venis al mi pro mia aparteno al la geja komunumo: miaj amikoj, mia politiko, vastigita kompreno de mi mem kaj de la socio, kaj kono de tre bela, tre riĉa kulturo. Ankaŭ ŝatindas la viroj!”

*Matthew McLauchlin*

**Naskiĝdato:**
14a de oktobro 1981

**Naskiĝloko:**
Saint John, Novbrunsviko, Kanado

**Loĝloko:**
Montrealo, Kebekio, Kanado

**Profesio:**
Tradukisto

**Lingvoj:**
angla, franca, hispana, itala, esperanto

**Trajto, kiun vi plej ŝatas pri vi mem:**
la cerbo

**Lasta filmo, kiun vi ŝatis:**
Hedwig and the Angry Inch

**Muziko/Kanto, kiu dancemigas vin:**
Io ajn, vere, de Pet Shop Boys, Mylène Farmer, aŭ Madonna

**Preferata loko, el la tuta mondo:**
Montrealo kaj Hispanio

**3 homoj, kiujn vi admiras:**
Svend Robinson (unua kanada parlamentano kiu elŝrankiĝis, longtempa defendanto de ĉiaj humanismaj kaj diversecaj motivoj); reĝo Johan-Karlo de Hispanio (post longa faŝisma edukado sub Franco, li renversis kaj apogis demokratian sistemon kontraŭ milita puĉo); Pierre Trudeau (li laŭleĝigis samseksamoron en Kanado en 1969)

*Kiuj estas la avantaĝoj/malavantaĝoj pri la samseksama vivo en via urbo kaj lando?*

Kanado estas treege antaŭeniĝinta lando pri samseksaj rajtoj. Kvankam kompreneble restas aferoj korektendaj, ni jam rajtas kunedziĝi en preskaŭ la tuta lando, ni estas konstitucie protektataj, la plejparto de kanadanoj apogas almenaŭ la plejparton de niaj rajtoj, kaj la plej grandaj urboj estas toleremegaj, aparte la mia, kiu havas la plej grandan gejan kvartalon en Ameriko.

*Ĉu la rolo de esperanto en via vivo estas granda?*

Lastatempe mi ne multe implikiĝas pri la esperanta komunumo miaurbe, ĉar ĉiuj eventoj okazas vespere kiam mi havas klasojn. Tamen mi jam estis tre aktiva; ekskarulon mian mi renkontis per Esperanto, kaj mia vojaĝo en Hispanio en 2002 multe faciliĝis per la helpo de esperantistoj.

*Ĉu vi havas planon pri la estonteco, rilate kaj al Esperanton, kaj al via seksorientiĝo?*

Mi ŝatus havi pli da mono por vojaĝi kaj ekkoni aliajn gejajn esperantistojn.

*Ĉu estas io ajn pli pri vi, kion ni devus scii?*

Min ĉagrenegiĝas, kiam la kvira komunumo ne sufiĉe faras por agnoski la diversecon en sia propra ĉirkaŭaĵo; malalte taksas sian kulturon kaj historion; kaj malhonoras kaj malakceptas aliajn homojn pro ilia seksorientiĝo, genra identeco, aŭ vivstilo. ▼

# Ĉu ni kunlaboru?

*La rolo de la samseksama movado en la esperanta movado ne estas ĉiam klara. Simile, la rolo de Esperanto en la samseksama medio, ne ĉiam evidentas. Por komenci kompreni la nuntempan situacion, Forumo faris kelkajn esencajn demandojn al Renato Corsetti, la prezidanto de UEA!*



*Ĉu Esperanto estas speciale alloga por minoritataj grupoj? Kion Esperanto povus kontribui al tiaj grupoj? Kiel la esperanta movado povus helpi la gejan kaj lesban komunumon?*

Efektive Esperanto ĉiam estis alloga por minoritataj grupoj. Ekzemple en la komenco de la pasinta jarcento la homoj, kiuj kredis ke oni devas rezigni pri milito por ordigi internaciajn disputojn, estas tre difinita malgrandega malplimulto. Kaj ili evidente estis frenezuloj, ĉar ankoraŭ nun multegaj homoj pensas, ke tion oni devas fari rilate al aliaj civilizoj. Oni nomis ilin iom moke "pacifistoj", tio estas "pacistoj". Granda "amo" ekzistis inter ili kaj la movado por Esperanto.
Ankaŭ en la pasinta jarcento la homoj, kiuj volis latinigi la skribon en Ĉinujo estis malplimulto, kaj pluraj el ili estis esperantistoj. Kaj tio observeblas en pluraj kampoj. Mi certas ke almenaŭ kelkaj el la plej maljunaj, kaj plej anglalingvaj el vi legis la libron de la bedaŭrata Peter Foster, *The Esperanto Movement*, kiu klarigas, ke en Britujo granda parto de la esperantistoj ankaŭ apartenas al aliaj "strangaj" sociaj movado.

Tio estas tute komprenebla ĉar ankaŭ Esperanto estas malplimulta, kaj sekve ĝiaj anoj ne povas malafable rilati al membroj de aliaj malplimultoj. Ja ili mem konstante ricevas la "mokojn de l' homoj". Pro tio la ĉeesto de samseksamaj esperantistoj inter ni ne estas pli stranga ol la ĉeesto de pluraj aliaj apartaj grupoj, kaj ĝi estas jam, laŭ mia juĝo, plene akceptata de la komunumo.

Kompreneble estus erare opinii, ke ĉiuj esperantistoj estas aŭtomate pli toleremaj ol la ceteraj homoj pri ĉiuj temoj. Iomete jes, sed ne aŭomate kaj ne ĉie kaj ne pri ĉio. Esperantistoj estas finfine ankaŭ





parto de sia nacia kulturo kaj ili estas forte influataj de ĝi. Provu demandi usonan kaj serban esperantiston, ĉu Usono pravis, kiam ĝi bombis Beogradon, kaj vi en multaj kazoj ricevos respondon kongruan kun tio, kion oni pensas pri tiu afero en la respektiva lando. Tio validas pri ĉiuj temoj, ĝis la plej banalaj. Provu demandi italan esperantiston, ĉu italaj manĝoj estas la plej bonaj en la mondo, kaj vi ricevos en multaj kazoj la stereotipan italan respondon.

Esperantistoj, tamen, estas pli toleremaj ol la ceteraj homoj kaj ankaŭ pri tio estas abundaj pruvoj. Tio permesas al malplimultaj movadoj kiel la geja kaj lesba movadoj trovi pli aŭskultemajn orelojn ĉie en la mondo ankaŭ en landoj, kie la geja aŭ lesba movadoj estas ankoraŭ en grandaj problemoj. Certe oni ne povas postuli ke esperantistoj el, ekzemple, islama lando, helpu gejajn eksterlandajn esperantistojn fari manifestacion en la centra placo de la urbo, kaj oni eĉ ne povas postuli ke ili aŭtomate akceptu la vidpunktojn de LSG pri ĉi tiuj temoj, sed certe ili aŭskultas kaj pripensas. Tio jam povas esti multo en kelkaj landoj.

> " Esperantistoj, tamen, estas pli toleremaj ol la ceteraj homoj (...). Tio permesas (...) la geja kaj lesba movadoj trovi pli aŭskultemajn orelojn (...) ankaŭ en landoj, kie la geja aŭ lesba movadoj estas ankoraŭ en grandaj problemoj."

*Kion povus tiuj minoritataj grupoj fari por helpi la esperantistojn? Kiel povus la samseksama komunumo pli age partopreni kaj kontribui al la esperanta movado?*

Simple, laŭ mi, per informado pri Esperanto en sia medio kaj instruado de Esperanto al aliaj gejoj kaj lesboj. Ju pli multe des pli bone. Poste, kompreneble, oni uzu Esperanton por krei kulturajn verkojn, sociajn eventojn, ktp. Ĉio kontribuas al Esperanto, al pli vigla Esperantujo. Esperanto travivis sian unuan jarcenton danke al homoj, kiuj luktis kaj suferis pro ĝi sed ankaŭ ricevis ĝojon pro la uzado de Esperanto kaj pro la sociaj kontaktoj, kiujn ili faris per Esperanto. Nun ni havas la eblecon intensigi tiun laboron kaj igi nian duan jarcenton ankoraŭ pli fruktodona por ni mem kaj por la mondo, ĉar finfine ni laboras por la mondo kaj ne nur por ni mem. Ni utiligu tiun ŝancon kaj provu trandoni la eblecojn kaj plezurojn de Esperanto ankaŭ al la gejoj kaj lesboj, kiuj ankoraŭ ne parolas Esperanton. ▼

*Renato Corsetti*

*daŭrigo de paĝo 4*

kafejoj kaj metibazaroj kovras la kuriozajn stratojn, kaj oni trovas multe por sin okupi, dum oni esploras la miriadon da anguletoj kaj breĉetoj de la ĉefurbo. Ĉu oni aĉetas la lokan spican zingibrokukon, ĉu oni serĉas la plej bonan regionan sukcenon, estas malfacile rezisti akiri ion. La litovoj estas famaj pro sia gaja dispozicio, kaj ili kutime feliĉe babilas kun vizitantoj, per la fragmentoj kiujn ili konas de via lingvo.

Dum la nokto, enirante la nuran gejan noktoklubon de Vilno, la loka etoso estas vere malsimila. La dubinde nomita "Men's Factory" ('Fabriko de Viroj') estas la sola rifuĝejo por la vilnaj gegejoj, la nura loko kie ili povas renkontiĝi sekure

ĉar batego de gejoj tra la urbo ne estas malordinara afero. La klubo lokiĝas ĉe la malantaŭa enirejo de neuzata deponejo, kaj ĝiaj eventoj estas anoncataj nur en grupoj kiel LGL. Ŝtalaj stangoj baras la pordon, kiun oni devas frapi por eniri per turnokruco. Interne, estas la polusigitaj sferoj de intensa kaj subpremita geja socio. Ĉe la dancejo, ludatas stereotipa 'tekno'-stila muziko, por preskaŭ nudaj brakumantaj lesboj. De tie, oni eniras kelke da ĉambroj, plenaj da kusenoj kaj televidiloj, montrante gejan pornografion. Evidentas, ke la klubo estis kreita por sekso, tamen granda parto de la geja publiko serĉas nur sekurecon kaj egalecon. Drinkinte ion, mi eliris en la malvarman vilnan aeron, por atendi la tempon, kiam la gegejoj povos renkonti la aliseksaman socion kun egaleco, kaj la litovaj gejoj povos finfine montri sian fieron. ▼

*originale verkita de*
*Stephen Almond, 2004/05/28*
*tradukita kaj publikigita laŭ permeso de*
*"Cherwell Online" • http://www.cherwell.org*

# Vortoserĉo: Seksa Diverseco

*La vortoj malsupraj estas troveblaj en la suba kadro. Oni devas serĉi horizontale, vertikale, supre, malsupre, dekstre, maldekstre kaj diagonale!*

| | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| B | E | B | Ŝ | R | Ĥ | A | Ŭ | O | X | X | W | L | H | B |
| B | G | Z | J | S | R | E | N | I | Z | Y | I | V | O | X |
| E | F | E | T | I | Ĉ | E | M | O | Q | E | W | T | M | J |
| O | L | U | L | B | O | O | A | Q | D | M | Ĵ | U | E | Ŝ |
| S | Z | J | H | C | A | W | M | M | F | F | Ŭ | T | S | Ĉ |
| T | J | Q | N | M | C | J | B | J | Y | D | A | S | K | K |
| H | F | Z | M | Ŭ | X | C | A | D | O | U | X | E | E | N |
| Z | M | S | Ŝ | Ĝ | O | Ĥ | Ŭ | Ŝ | Ŝ | D | B | K | S | U |
| C | K | Ŭ | Ŭ | Ĝ | V | A | S | N | U | L | Q | S | C | Ĝ |
| U | T | E | D | A | Z | Z | E | I | C | F | N | E | I | I |
| Ĝ | P | R | C | G | Y | C | K | H | H | B | W | M | R | X |
| R | L | L | A | W | R | Ĝ | S | J | B | R | Q | O | P | O |
| D | U | A | Ŝ | N | Ŝ | I | E | Ĉ | P | B | Q | H | A | M |
| X | R | Ŭ | F | Z | S | G | M | B | Ĝ | G | Ŭ | M | K | E |
| G | S | B | Ĵ | S | V | S | O | J | Q | Y | J | Z | C | T |
| B | E | I | Ŭ | F | Ŭ | L | E | N | Ĵ | Z | I | H | Q | S |
| F | K | Ĉ | D | N | U | Q | N | K | L | Ĵ | A | Ĝ | T | E |
| S | S | G | C | L | Ĉ | L | Ŭ | Ĝ | S | N | H | A | N | V |
| O | E | Ĝ | J | Z | E | E | Y | F | Z | E | X | P | Ĥ | S |
| L | M | W | I | Z | S | A | Ŭ | M | Ĉ | W | M | T | E | N |
| Q | O | Y | Ĵ | E | Ĝ | Ĝ | K | M | B | Z | H | O | S | A |
| B | A | L | I | S | E | K | S | E | M | O | M | S | R | R |
| J | G | Z | P | P | J | F | S | C | F | W | B | F | P | T |
| C | F | Q | D | J | L | X | V | Q | S | Q | V | C | B | N |
| Y | F | W | Z | W | D | W | Y | V | Ĥ | U | W | Ŭ | M | W |
| J | S | A | M | S | E | K | S | A | M | O | Z | Z | Q | Ĵ |
| J | K | V | S | E | N | S | E | S | K | S | E | M | O | G |
| S | S | Ŭ | U | I | W | V | W | A | Q | R | Z | P | H | U |
| Ĥ | U | P | Y | Ŭ | Ĥ | W | N | U | Z | N | B | D | C | I |
| D | S | O | S | W | W | G | B | F | A | J | G | U | G | Ŝ |

| | |
|---|---|
| samseksamo | transvestemo |
| aliseksemo | kapricseksemo |
| ambaŭseksemo | plurseksemo |
| senseksemo | tutseksemo |
| transseksemo | fetiĉemo |